


La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №12



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №12 (278)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Schlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 70-71.

Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №12 (278).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 декабря 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Temo	5
Halina Gorecka. La Esperantisto de la Jaro: Kiu estos la dudeka?	6

Eventoj	11
UEA ŝanĝas sian Ĝeneralan Direktoron.	12
UEA serĉas novajn estraranojn.	12
Jorgos. Esperanto-Pado en vilaĝeto.	14
Povilas Jegorovas. Zamenhof-ekspozicio en la koro de Kaŭno	15
Olga Shiliaeva. "Teo kaj Amo" kreskas kaj maturiĝas	17
Ronald Schindler. La plej frua ĉi-jara Zamenhoffesto okazis en Berlino	19
Volodimir Hordijenko. Esperanto sonas en Karpatoj	20
Euleax Elias Gonçalves de Lima Pereira. Gaŭĉa Renkontiĝo	21
Marcionilo Vasconcelos. Ĉu du Esperanto-movadoj, aŭ unu?	22
Aleksandr Lebedev. La tria Lingvotrejnado en Uralo	23
Petro Garami. JER: Sekreta raporto	24
Pri Esperanto en la Ĝenerala Konferenco de Unesko	25
Humphrey Tonkin. Humphrey Tonkin alparolis la tradukan servon de UN.	26
Marian Vochin. Akademias prezentoj en Rumanio	27
<i>El Popola Ĉinio</i> serĉas redaktoron	27
TEJO dungas subvencipetiston	28
Trezoro Huang Yinbao. Ĉinio: Instrui la anglan kaj Esperanton	29
UEA serĉas redaktantojn por Esperanto.net	30
Koncize (11 informoj)	31

Tribuno	32
Xavi Alcalde. Per Esperanto por la rifuĝantoj	33
La Centra Oficejo ekparolis angle	38
Respondo de la Estraro de TEJO al la artikolo "La Centra Oficejo ekparolis angle".	40
Amri Wandel. Novaj horizontoj trans Plutono	44
Mireille Grosjean. Premio La Torre.	47

Arkivo	48
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Teo Jung (1892-1986)	49
Przemysław Wierzbowski. Naskiĝtago de la Bonhumora Zamenhofano	52
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en decembro 2017	54

Kulturo	55
Sten Johansson. Kara Lutek: novelo	56
Vjaĉeslav Ivanov. Prilingve el Nitro (Recenzo: <i>Prilingve en Nitro</i>)	61
Ricevitaj gazetoj	62
Flo! <i>La Granda Aventuro</i> : Nova albumo de i.d.c.	63
Marija Beloŝeviĉ. Omaĝe al Lucija Borĉiĉ	64
José Antonio del Barrio. Nova eldono de la libro <i>Miguel Hernández, poeto de l'popolo</i>	65
Halina Gorecka. Literatura konkurso <i>Liro-2017</i>	66
 Mozaiko	 67
Tri enigmoj	68
Amuzaj dialogoj (Tradukis Kukucapa Nemoskovskaja).	68
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	69
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	70

Kvankam ĉi tiu numero formale fermas nian unuan virtualan jaron, ni ankoraŭ ne deziras “Feliĉan Novan Jaron 2018”, ĉar ankoraŭ ĉi-jare je la Zamenhofa Tago, aperos nia literatura suplemento, kaj la januara *Ondo* pretos la lastan tagon de l' nuna jaro. Ni esperas, ke vi kontentas pri la nova formo de nia gazeto kaj pretas daŭre esti kun ni. Eĉ trans Plutono!

Kovropaĝa foto: NASA / Johns Hopkins University Applied Physics Laboratory / Southwest Research Institute – <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=41850334>

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



La 1an de decembro, je la tago de la enretigo de ĉi tiu *Ondo*, komenciĝas la voĉdonado por la Esperantisto de la Jaro 2017. La nomon de la dudeka laŭreato de ĉi tiu honora titolo vi legos en la januara *Ondo*. Kiu, laŭ vi, estos proklamita ĉi-jare?

La Esperantisto de la Jaro: Kiu estos la dudeka?

En Esperantujo estas multaj premioj kaj honoraj titoloj. Vaste konata estas la kulturpremio, kiun la fondaĵo FAME kaj la germana urbo Aalen kreis por distingi personojn kaj instituciojn pro iliaj meritoj en stimulado de internacia interkompreno per kulturaj verkoj en Esperanto. OSIEK kaj LF-koop atribuas literaturajn jar-premiojn. La premion Deguchi, kiun finansas la japana religia movado Oomoto, la estraro de UEA aljuĝas pro plifirmigo de internacia amikeco. Trofeo Fyne estas ĉiudujare donata de UEA al la plej aktiva landa Esperanto-Asocio. Konata estas ankaŭ la premio Grabowski...

Sed estas preskaŭ nekredeble, ke en Esperantujo dum pli ol cent jaroj de ĝia ekzistado mankis honora titolo por persono plej elstare rekomendinta sin dum unu jaro, malkiel en la Granda Mondo, kie la gazetaro (ekzemple, *Time*) faras la ĉiujaran proklamadon de "la homo de la jaro" tradicia institucio, kaj la Nobel-komitato elektas plurajn premiitojn en diversaj branĉoj. Multaj sportaj, kulturaj kaj amatoraj komunumoj ĉiujare elstarigas inter siaj anoj la plej eminentajn, kaj oni konas la filmaktoron de la jaro, la futbaliston de la jaro ktp.

En 1998 la internacia sendependa magazino *La Ondo de Esperanto* decidis ŝtopi la breĉon kaj iniciatis la proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Per tiu honora titolo estas distingata persono, kiu en la koncerna jaro plej multe kontribuis al Esperanto. Pri la efektivigo de la projekto zorgas du komisionoj – kandidatiga kaj elekta – en kiuj kunlaboras kompetentaj personoj, ĝuantaj internacian rekonon kaj prestiĝon, entute: pli ol trideko da personoj – nunaj kaj eksaj aktivuloj de UEA, SAT, Civito, redaktoroj, sendependaj ekspertoj.

Ni vidu la liston de la ĝisnunaj esperantistoj de la jaro.

La skota poeto **William Auld** estis proklamita la Esperantisto de la Jaro 1998. La proklamo rekonas la tiujarajn meritojn kaj atingojn de William Auld, interalie, la vastan amaskomunikilan eĥon pro lia kandidatigo al la literatura Nobel-premio; la kompletigon de la kolosa tradukprojekto Tolkien en Esperanto; la prudenton kaj volfirmon en la afero pri *La Manto*. Krome, ĉi tiu elekto estis bona komenco por la Jubilea Jaro de Auld, kiu 75-jariĝis en 1999.

Estis grave, ke la elekto de la unua laŭreato estis tre pozitive akceptita en la tuta esperantista komunumo. Intervjuo kun li aperis en multaj Esperanto-gazetoj, la projekto ricevis multajn laŭdojn kaj aprobojn kaj ekvivis.



Auld estis la unua

La Aŭstralia juristo **Kep Enderby**, prezidanto de UEA kaj de Esperanta Jura Asocio, iĝis la Esperantisto de la Jaro 1999. Tiu ĉi proklamo rekonis la meritojn de Kep Enderby en la fortikigo de Esperantujo (aktiva partopreno en multaj kongresoj kaj tre grava parolado en la Berlina kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo) kaj en la eksteraj rilatoj (precipe aktivado en la Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Seulo).



Kep Enderby,
la dua laŭreato

La tria elekto alportis surprizan rezulton, ĉar inter la 20 kandidatoj neniu ricevis plimulton de la voĉoj, kaj estis elektitaj tri Esperantistoj de la Jaro 2000.

Hans Bakker (Nederlando) meritis la rekonon pro la sukcesoj en la agado por Esperanto en Afriko.

Mauro La Torre (Italio) iĝis laŭreato pro la projekto Interkulturo, kies kvazaŭ-lernejo Tibor Sekelj tiam ampleksis preskaŭ 100 klasojn el trideko da landoj kun ĉirkaŭ du mil lernantoj.

Jouko Lindstedt (Finnlando) estis distingita pro la prizorgo de interreta BJA-listo, okazigo de seminario dediĉita al la 20-jariĝo de la Manifesto de Rauma kaj pro la *Hejma Vortaro*, redaktita de li, kiu estis disvendita naŭ monatojn post la eldono kaj represita post la Tel-Aviva UK.



Osmo Buller

Por eviti tian multecon da “jarherooj” oni decidis apliki la regulon laŭ kiu “Se pli ol unu persono ricevos egale plej multajn voĉojn, kiel laŭreato estos proklamita tiu, kiun proponis pli multaj kandidatigantoj. Se ankaŭ la kandidatigaj voĉoj estos egalaj, oni voĉdonos duafoje, ene de du tagoj, elektante unu el la personoj, kiuj ricevis la saman kvanton da voĉoj”.

En la sekva jaro ĉi tiu regulo estis aplikita: **Osmo Buller** estis elektita la Esperantisto de la Jaro 2001, ĉar li ricevis pli multajn kandidatigojn ol Claude Piron, kiu ricevis same multajn voĉojn. Buller per sia demisio en 2001 finis la rezultorican deĵorperiodon kiel Ĝenerala Direktoro de UEA. Danke al li la Gazetaraj Komunikoj de UEA regule kaj objekte informis la esperantistaron pri UEA. Lia tiujara restado en Ĉinio kaj Litovio aktivigis la movadon tie kaj faris la rilaton de aŭtoritatoj en tiuj du landoj pli favora al Esperanto.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



En Esperantujo aperis kaj sukcese evoluas nova kultura projekto – filmfestivalo “Teo kaj amo”. Por la dua konkurso, kies rezulto estis anoncita ĉi-aŭtune en Ĉinio, la organizantoj kolektis 79 filmojn el 27 landoj kaj invitis dek laŭreatojn por la festivalaj solenaĵoj.

UEA ŝanĝas sian Ĝeneralan Direktoron



En kunsido la 31an de oktobro la Estraro de UEA decidis pri grava ŝanĝo en la administrado de UEA, kun la konsento kaj subteno de la Ĝenerala Direktoro. D-ino Veronika Poór, kiu laboras en la Centra Oficejo ekde la komenco de 2016 kaj kiel Ĝenerala Direktoro ekde majo 2016, transdonos sian postenon la 1an de januaro 2018 al s-ro Martin Schäffer, la nuna Ĝenerala Sekretario. Kiel volontula estrarano, Schäffer gvidis la financajn analizojn kaj oficajn konsultiĝojn, kiuj motivis la decidon. Transprenante sian novan rolon, li demetos siajn postenojn kiel estrarano kaj komitatano.

“Rigardante nian malfacilan financon situacion, kaj konsultinte niajn oficistojn, ni venis al la konkludo ke necesas freŝa komenco,” klarigas d-ro Mark Fettes, la Prezidanto de UEA. “La Asocio survojas al kelkaj gravaj renovigoj, kiuj postulas fokusitan kaj harmonian kunlaboron. Feliĉe ni havas tiucele la plenan subtenon de d-ino Poór, kiu aktive kunlaboros por kiel eble plej glata transiro dum kelkmonata periodo”.

D-ino Poór konsentas: “La nuntempa situacio de la Asocio necesigas Ĝeneralan Direktoron, kies fortaj flankoj estas aliaj ol la miaj el la tre diversaj kaj vastaj kapabloj atendataj de la postenulo. Mi tre ĝojas, ke mi povos transdoni la taskaron al persono, kiu kaj tre bone konas la Asocion, kaj havas profundajn konojn en la plej bezonataj laborkampoj”.

Schäffer, multjara komitatano de UEA kaj estrarano ekde 2013, laboros ĉefe en siaj kutimaj loĝlokoj en Meksiko kaj Germanio, sed en konstanta kontakto kun la Oficejo. Li antaŭvidas bonan kunlaboron kun siaj kolegoj en Roterdamo kaj en la Estraro.

GK UEA

UEA serĉas novajn estraranojn

Ekde la 1a de januaro 2018 Martin Schäffer transprenos la funkcion de Ĝenerala Direktoro de UEA kaj forlasos la postenon de Ĝenerala Sekretario. La Estraro de UEA krome esprimis ke la nunaj laborfortoj ne estas sufiĉaj por taŭge mastrumi la kompleksan fakaron de la organizo.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

“Teo kaj Amo” kreskas kaj maturiĝas

La 21-28an de oktobro Ĉinio gastigis gajnintojn de la 2a Konkurso de mallongaj filmoj “Teo kaj Amo”, kiun sub la aŭspicio de UEA en 2014 lanĉis la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia (ĈRI).

Partopreni povis profesiaj kaj amatoraj filmistoj – kreemaj homoj el la tuta mondo. Ĉiu filmo devis esti ne pli ol 15-minuta kaj nepre rilati al ambaŭ temoj: “teo” kaj “amo”. Se dum la unua konkurso “amo” signifis korajn rilatojn inter viro kaj virino, en la dua la organizantoj plivastigis la sencon de la elemento “amo” kaj akceptis filmojn, kie aperas amo al iu ajn subjekto aŭ objekto: al homo, libro, vivo, Esperanto ktp. Estis akceptataj filmoj en iu ajn lingvo. ĈRI anoncis donaci al reprezentantoj de la 10 premiotaj filmoj senpagan vojaĝon al Ĉinio por sep tagoj oktobre de 2017.

La dek premioj estis: Plej bona filmo, Plej bona scenaristo, Plej bona reĝisoro, Plej bona desegnofilmo, Plej bona originala muziko, Plej bona ĉefaktoro, Plej bona ĉefaktorino, Plej bona kameraisto, Plej bona muntisto, Speciala(j) Premio(j).

Do entute por la dua filmkonkurso la organizantoj kolektis 79 filmojn el 27 landoj (en 2015 al la unua konkurso venis 45 filmoj el 20 landoj).

La premidona ceremonio okazis la 26an de oktobro en novkonstruita teatro de la gubernio Dushan. Sur la ruĝa tapiŝo al la teatro iris reprezentantoj de Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Kubo, Litovio, Pollando, Ruslando, Slovakio, Koreio, Svislando kaj Usono.

Inter la spektantoj de la ceremonio estis ne nur festivalanoj, sed ankaŭ gravuloj de la urbo, ĵurnalistoj de ĈRI kaj ekstera publiko, kiu pagis por aĉeti la enirbiletojn. Por la evento estis uzataj du lingvoj – Esperanto kaj la ĉina. Dum la ceremonio oni povis spekti filmojn de ĉiuj premiitoj kaj honore aplaŭdi, kiam la gravuloj enmanigis





Olga Shiliaeva (en la centro) en la premia ceremonio

diplomojn, pokalojn kaj florojn al la gajnintoj, anĝeloj¹ kaj urboj² de “Teo kaj Amo”. La etoso estis festa! La ceremonion ĉeestis kaj oficiale parolis la prezidanto de UEA Mark Fettes, kaj pranepino de L. Zamenhof, Margaret Zaleski-Zamenhof.

Dum aliaj festivalaj tagoj la partoprenantoj ekskursis en Hangzhou, vizitis Zhejiang-an Agrikulturan kaj Forstokulturan Universitaton, spertis vilaĝan vivon de ĉinoj, vizitis teo-kampojn kaj kavernon. Antaŭ kaj post la festivala semajno okazis prezentado de la konkurso kaj filmoj en lernejoj kaj universitatoj tra Ĉinio. Do la festivalo donacis al ĉiuj neforgeseblajn rememorojn kaj kompreneble kulture riĉigis ĉiujn. Unu el la celoj de la festivalo estis montri al la publiko, ke Esperanto estas viva, utila, vigla kaj profita... Sendube la celo estis plenumita!

Nome de anĝeloj de “Teo kaj Amo”, mi kore gratulas ĉiujn reĝisorojn kaj aktorojn pro la premioj kaj dankegas la organizantojn, subtenantojn, amaskomunikilojn pro ilia grandioza kaj certe fruktodona laboro! Ni ne haltu!

Baldaŭ aperos libro “Teo kaj Amo: Rakonto pri Teo”, kiu registras la plej gravajn travivaĵojn de te-am-anoj danke al la projekto “Teo kaj Amo”.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Pri Esperanto en la Ĝenerala Konferenco de Unesko

La 6an de novembro reprezentanto de UEA faris triminutan paroladon antaŭ dumilo da diplomatoj, aktivuloj kaj oficistoj el la tuta mondo, en la plena sesio de la 39a Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazanta ĉe la sidejo de Unesko en Parizo. Nur dudeko da internaciaj NROoj ricevis tian lokon en la tagordo.

La voĉo kaj la vizaĝo de UEA estis tiuj de Rakoen Maertens, juna aktivulo el Belgio kaj komisiito de TEJO pri agado ĉe Unesko, kiu jam akiris spertojn pri eksteraj rilatoj en pluraj internaciaj aranĝoj. Maertens emfazis la kernan gravecon de komunikado en la laboro de Unesko. Laŭ li, interkompreniĝo, trovo de komunaj intereso, partneriĝo kaj kunlaboro ja estas la bazo de la agado. Tamen en internaciaj medioj “komunikado ne ĉiam estas, kia ĝi ŝajnas esti. Estas baroj”, Inter tiuj baroj li substrekiis “malegalecon en memesprimado, ĉar difinita lingvo povas esti ne agnoskata, dum aliaj jes. Uzi specifan lingvon, apartenantan al specifa kulturo, kreas malegalecon en la komunikado”.

Emfazante ĝian longan kunlaboron kun Unesko, Maertens elstarigis la aktivan engaĝiĝon de UEA por “profunda komunikado, lingva kaj kultura egaleco, lingva diverseco kaj interkultura interŝanĝo”. Li kaptis la okazon ankaŭ por menci la centan datrevenon de la forpaso de Zamenhof, solenatan sub aŭspicio de Unesko, kaj la lastatempan aperigon de la *Unesko-Kuriero* en Esperanto, kies ekzempleron li montris dum la parolado.

La parolado finiĝis per inspiraj vortoj kaj bondeziroj por “profunda, signifoplena kaj konstruema dialogo, en malferma interkompreniĝemo”. Maertens invitis la ĉeestantojn al solena aranĝo ene de la Unesko-konstruaĵo la 11an de decembro por oficiale fermi la Zamenhof-Jaron.

GK UEA

Humphrey Tonkin alparolis la tradukan servon de UN



Je invito de la direktoro de la Dokumentada Fako de UN Cecilia Elizalde, la reprezentanto de UEA ĉe Unuigintaj Nacioj, d-ro Humphrey Tonkin, la 17an de septembro prelegis ĉe la Tradukaj Servoj de UN pri “La Graveco de Lingvoj en la Tagordo de UN”. Lia prelego emfazis, ke la oficistoj de UN, ekster la lingvaj servoj, emas subtaksi la gravecon de lingvoj ne nur ene de la strukturoj de UN sed ankaŭ en la programo de internacia evoluigo. “Bedaŭrinde la lingvaj servoj de UN

foje kompareblas kun la UN-sidejaj akvotuboj, – li asertis: – dum ili funkcias, neniu laŭdas la tubistojn; sed se ili misfunkcias, ĉiu plendas”. Li atentigis pri la fakto, ke lingvoj entute ne menciigas inter la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, nek inter la 169 “celtabuloj” kiuj akompanas ilin.

Aliflanke li notis, ke en UN kreskas la interesiĝo pri multlingvismo. En majo rezolucio de la Ĝenerala Asembleo kreis novan Internacian Tagon de Tradukado, kiun oni festos ĉiujare la 30an de septembro; kaj nova rezolucio pri multlingvismo, akceptita de la Ĝenerala Asembleo kaj baldaŭ aperonta en sia fina formo, emfazas la gravecon de dialogo – do ne nur unudirekta komunikado – en la daŭrigeblo de la agado de UN, kaj atentigas pri la valoro de scipovo kaj utiligo ankaŭ de lokaj lingvoj, aldone al la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Asembleo.

Li same atentigis, ke lingva diskriminacio kaj ĝia forigo estas aferoj ne nur de identeco (oni ne diskriminaciu kontraŭ homoj pro la lingvoj kiujn ili parolas, same kiel oni ne diskriminaciu pri ilia haŭtkoloro aŭ sekso) sed, multe pli grave, aferoj de komunikado (oni ne uzu lingvojn kiujn la alparolantoj ne komprenas, sed serĉu lingvojn komunajn al ĉiuj, en kiuj plena kaj dudirekta komunikado povas okazi).

La menciita rezolucio pri multlingvismo proponas ankaŭ, ke oni inventaru la lingvajn kapablojn de la pli ol 40.000 dungitoj de UN, tiel ke oni utiligu pozitive la lingvajn rimedojn de la organizaĵo. “Lingva diverseco ne estas nur problemo, – diris Tonkin, – sed ankaŭ pozitiva afero. Ideale, UN trovu internajn solvojn al lingva komunikado kiuj estas samtempe justaj kaj efikaj, kaj eksterajn lingvajn kanalojn kiuj ebligu komunikadon kun la popoloj de la mondo en iliaj lingvoj, por efikigi aŭtentikan dialogon”.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Dum du semajnoj (6-20 nov 2017) en la Biblioteko de la Deputita Ĉambro de Italio funkciis ekspozicio pri Zamenhof, organizita de la ambasado de Pollando en Romo k de Itala E-Federacio. (uea-membroj).

Meze de oktobro en la Universitato de Seviljo komenciĝis kurso “Esperanto: akademia lingvo” kun agnosko de ses kredit-poentoj, validaj por ĉiuj fakoj de la universitato k kun ĉeesta daŭro de tri horoj semajne. La kurso, kiun gvidas prof. Vicente Manzano-Arondo, daŭros ĝis meze de junio 2018. (*La Bitbulteno*)

30 okt 2017 en la universitato Allame Tabatabai k 7 nov en la universitato Pajeme Nur, ambaŭ en Tehrano, okazis seminarioj pri Eo, danke al kiuj en ambaŭ universitatoj ekfunkciis kursoj de Eo. (Landa Agado)

3 nov en la Biblioteko Xosé Neira Vilas de Vigo (Galegio, Hispanio) okazis prezentado de la E-traduko de *Memoraĵoj de kampara knabo* de la galega aŭtoro Xosé Neira Vilas, tradukita de la viga filologo Suso Moinho k eldonita de Mondial. (*La Bitbulteno*)

1 nov en la Hebrea Muzeo de Bolonjo (Italio) Giorgio Silfer prelegis pri “Se mi ne estus hebreo... un’indagine sulle origini dell’esperanto”. (HeKo)

10 nov en la Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj (RUDN) okazis la 8a scienc-praktika konferenco “Amaskomunikiloj en la multpolusa mondo: problemoj kaj perspektivoj”, kadre de kiu okazis du priesperantaj prelegoj: “Spertoj de redaktado de la ĉiumonata internacia revuo en Esperanto kun 110-jara historio en la nuntempaj kondiĉoj” (Anna Striganova) k “Apliko de Esperanto en la sociaj retoj en la kondiĉoj de multpolusa mondo” (Dmitrij Ŝevĉenko).

La juna moskva filologo Aleksandr Piperski ricevis la premion “Prosvetitelj” (Kleriganto), pro sia libro *Lingvokonstruado. De Esperanto ĝis la lingvo Dothraki* (Конструирование языков. От эсперанто до дотракийского, 2017). (vk.com)

Ĵus aperis la ĉinlingva 299-paĝa libro *La kreinto de Esperanto kaj Homaranismo – D-ro Zamenhof kaj Lia familio*, verkita de Song Yunsheng (verkisto, tradukisto k eksa vicprezidanto de Liaoning-a E-Asocio) k eldonita de Liaoning-a Universitato; nun la aŭtoro laboras pri la libro *Naturaj lingvoj kaj artefaritaj lingvoj*. (Wu Guojiang)

Post la forpaso de Marjorie Boulton la Ea PEN-Centro serĉas novan kandidaton por la literatura Nobelpremio; tial ke nur pasintjare okazis selekto, estas reproponitaj la samaj nomoj: István Nemere, Giorgio Silfer, Trevor Steele k Spomenka Ŝtimec. (HeKo)

3-5 nov Ŝanhaja E-Asocio okazigis la 2an E-Forumon kun la ĉeftemo “Esperanto konektas la mondon – nova ŝanco en la Zono kaj Vojo”, en kiu estis prezentitaj sep prelegoj. (*El Popola Ĉinio*)

Je 30 nov al la 103a UK de Eo, okazonta venont-somere en Lisbono, aliĝis 284 e-istoj el 46 landoj; plejmulte el Brazilo 30, Francio 27, Germanio 24, Japanio 17, Portugalio 16, Usono 14, Nederlando 13, Pollando 13, Belgio 12. (uea.org).



“Ĉu oni jam rikoltis sufiĉe da intereso kaj emo kunlabori por starigi internacian stabilan kunordigon de aktivado por rifuĝintoj per Esperanto? Ĉu ekzistas hodiaŭ iu alia maniero apliki plej klare kaj preme la internan ideon de nia kara lingvo?” – demandas la kataluna aktivulo Xavi Alcalde fine de sia pensiga artikolo. Viaj respondoj estas bonvenaj.

Per Esperanto por la rifuĝantoj

Multaj esperantistoj interesiĝas pri la dramo de la rifuĝintoj (ĉu rifuĝantoj? ĉu iam rifuĝontoj?) Mi tion scias, ĉar pasintsomere en Seulo en la kadro de la Internacia Kongresa Universitato kaj kunlabore kun la Akademio de la Sciencoj de San Marino, mi gvidis kurson pri la movado de solidareco kun la rifuĝintoj en Eŭropo. Pro forta horzonozo kaj dormomanko la rezulto miaflanke estis nur duonkontentiga. Tamen, la komentoj de la ĉeestintoj estis tre pozitivaj. Sekve, tio plene ŝuldas al la graveco de la temo. Fakte, kelkaj el ili ja aktivis loke en la solidara agado por la rifuĝintoj, kiel Olev en Svedio kaj pluraj homoj en Francio. Dum la lasta sesio mi demandis al la partoprenantoj kion esperantistoj povus fari tiurilate. Jen kelkaj konkludoj prie.

Ĝenerale, ili vidas esencan rilaton inter la valoroj de esperantismo kaj la solidara agado kun la rifuĝintoj. Pro tio ili bedaŭras ke tiu afero ne aperas pli ofte en niaj revuoj kaj debatoj, aŭ kiel ĉefa temo de universala kongreso. Jen ekzempla opinio: “Mi tre dankas tiun kurson, ĉar tiu temo **ege** taŭgas. Mi tute ne komprenas la sintenon de niaj plej elstaraj organizaĵoj, kiel UEA pri tiu temo”. Simile, “mi ŝategus, ke la kurso povus esti pli longa, kun detaloj de la aktivula agado”. Rumanino daŭrigas tiun esencan rilaton, konfesante ke “mi hontas, ke nia lando ne estas por rifuĝantoj alloga lando”.

Koncerne konkretajn proponojn, multas ideoj por influi la publikan opinion en kaj ekster Esperantujo, kiel “reagi per opinienhavantaj dokumentoj”, “informi en la gazetaro por konsciigi ĉiujn”, “kontribui al kreo de tutmonda perspektivo pri la temo” kaj “organizi debatojn eĉ nacilingvajn pri la konfliktoj inter diverspartianoj”. Tiel, oni konsilas nin ne paroli nur kun samideanoj, ĉar “eviti kontaktojn kun ekstremdekstruloj signifas ilian estontan venkon, kiel en Francio”. Jen pripensinda argumento, kiu lastatempe ĉefrolis en intensaj debatoj en la diskutforumoj de SAT pri la rajto de memesprimo en la oficiala organo *Sennaciulo*.

Inter la seulaj ideoj, ankaŭ oftas la kunlaborado kun tiuj organizoj kaj individuoj, kiuj jam helpas loke kaj internacie. Interalie, ili petas “praktike helpi neregistaraĵajn organizojn” kaj “partopreni la lokajn helpajn agadojn”. Tio estas partopreni la jam ekzistantan socian movadon de solidareco kun la rifuĝintoj. Tiel ni povus “fari kiel aliaj internaciaj volontuloj”, ekzemple, “informi pri la agado kaj helpideoj, kiuj ekzistas en diversaj landoj kaj pri la ebloj kunagi pere de monkokleto, traduko de informoj aŭ rekta helpo al certaj homoj”. Kelkaj el tiaj proponoj estas sufiĉe konkretaj, nome “financa solidareco por enskribi la junulojn en agadoj

organizitaj, sportaj agadoj por ĉiuj, ktp”. Tiusence, kutimas la mencio pri “helpado al la infanoj de migrantoj por enskribiĝi en la lernejo” kaj en “organizitaj ferioj”. Kaj ne malofte aperas ankaŭ la lingva dimensio de la afero, ekzemple, “instruado de la loka lingvo, precipe al la infanoj kaj junuloj” aŭ “manifestacioj du-lingve (per dulingvaj ŝildoj)”. Kompreneble, tio surprizos nenium, ĉar oni jam scias ke averaĝe esperantistoj pli interesiĝas kaj sentemas pri lingvaj temoj ol la ceteraj homoj.

Sekve, stariĝas proponoj por subteni la lingvajn rajtojn de ekzilitoj – oni uzas tiun vorton por ne diferencigi inter migrantoj kaj rifuĝintoj – eĉ en niaj renkontiĝoj, kiel en la pasinta UK en Seulo. Tiel, “estintus tre amuze kaj grave se ni povus profiti la okazon de la kursfermo por inviti samideanojn de la ‘ekzilitaj’ landoj por fari komenton el sia vidpunkto”. Prava konsilo, mi devintus tion elpensi antaŭe.

Francino, kiu havas sperton pri tia solidara agado avertas tamen, ke “ĉefe ili deziras lerni rekte la anglan”. Pro tio ŝi sugestas, ke “ni lernu simplan anglan por komuniki kun ili”. Tiu ideo memorigas min pri la sugesto de Giuliano Turone en la paĝoj de la revuo *Esperanto* pri la rolo de tiuj esperantistoj, kiuj scipovas la araban. Temas pri ideo, kiun oni ankaŭ debatis en la UK de Nitro en 2016 kun la sugesta konkludo pri amasa lernado de la araba. Ĉu ni jam plenumis ĝin?



En mia propra sperto vizitante la tielnomatan ĝangalon de Calais (Kalezo) en la nordo de Francio, mi observis ke la araba estis la ĉefa komunika lingvo inter la ekzilitoj, kvankam ili venis el 30 malsamaj landoj kaj sekve, multaj el ili ne komprenis ĝin. Dume, la franca estis la ĉefa lingvo uzata de la lokaj aktivuloj (kaj kompreneble en la franca ŝtata sistemo), kaj la angla de la internaciaj volontuloj, kiuj venis precipe el Britio. Do, la scipovo de la araba ja helpus, sed tio ne tute solvus la lingvan problemon, kiu certe ekzistas. Ĉu ŝanco por Esperanto?

Tiurilate kelkaj proponoj emfazas eblajn rolojn de nia lingvo. Ekzemple, “ni provu instrui Esperanton, por ke la rifuĝintoj interkompreniĝu inter ili”. Aliaj petas “trovi rimedojn por venigi etulojn al la infana kongreseto”. Tamen, ne ĉiam ekzistas espero tiurilate. Tiusence, “oni povus instrui al ili Esperanton, sed tio estas nur idealo!” Ĉu estas tamen iu espero por tion fari? Miaopinie, jes. Fakte, laŭ alia partopreninto en la seula kurso, “kelkaj esperantistoj jam instruas Esperanton ene de rifuĝintaj loĝejoj, mi aŭdis”. Tiu opinio pravas. Mi persone konas plurajn kazojn. Hélène Dubois, kiu partoprenis la kurson en Seulo, klarigas al ni sian travivaĵon prie. “En Treagstel (Bretonio, Francio) ni ĝemeligis esperantistojn kaj rifuĝantojn, ĉar persona kontakto gravas.” Tiel, la rifuĝanto povas kontakti tiun specialan helpulon laŭbezzone. El tiu perspektivo, gravas ankaŭ, ke oni donu al ili liberan tempon por ke li interkonatiĝu kun la ricevanta socio. “La rifuĝantoj en Tregastel ŝatis multe promeni kaj viziti la urbodomon, ludi ludojn, malkovri bretonajn dancojn, ktp. Ankaŭ ili kuiris manĝaĵojn el sia landoj”.

Hélène daŭrigas sian detalan proponon klarigante plurajn kialojn por lernigi al ili Esperanton, “se rifuĝantoj tion ŝatus”. Unue, ĉar ili havas tempon por lerni. Jen gravega kialo, pri kiu ĝenerale homoj ne konscias. Kiam en la somero de 2016 mi vizitis Calais, mi konis homojn, kiuj loĝis tie dum pli ol unu jaron. Dum la nokto ili klopodis atingi Brition, laŭ ĉiam pli riskaj vojoj. Dum la tago ili havis nenion por fari. Kaj mi trovis similajn situaciojn en aliaj mondopartoj, inkluzive de Sebto (aŭ Ceŭto) kaj Melilo, kie la ekzilitoj atendas dum monatoj (kaj ofte jaroj) la decidon pri sia rajto loĝi en Hispanio kaj sekve en Eŭropo.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La Centra Oficejo ekparolis angle

Dum jardekoj la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo estis la plej esperantlingva loko en la tuta mondo, sed jam ne. Volontuloj ne plu bezonas scipovi Esperanton, kaj por komuniki kun ili la oficistoj devas paroli angle.

De multaj jaroj en la Centra Oficejo krom la dungitaj oficistoj de UEA regule laboras ankaŭ volontuloj de TEJO kaj UEA, kiuj kontraŭ senpaga loĝado kaj modesta rekompenco plenumas multajn taskojn por la asocioj.

Lastatempe volontuloj ricevis pli respondecajn taskojn, kiam financaj malfacilaĵoj devigis UEA-n ŝpari monon. Ekzemple la Jarlibro, kiu ĉiam antaŭe estis redaktita de pagata oficisto, ĉi-jare estis preparita de volontulo kun malmulta sperto pri la Esperanto-movado.

Eĉ se la volontuloj ne ĉiam havis perfektajn konojn pri la kulturo kaj movado, ili dum la antaŭaj jaroj tamen ĉiam kapablis bone komuniki en Esperanto, kaj dum la volontulado perfektigis sian lingvoscion. Antaŭ unu jaro TEJO tamen decidis ne plu postuli, ke novaj volontuloj scipovu Esperanton.

Anstataŭe TEJO en sia anonco ĉe Eŭropa Volontula Servo en majo 2016 skribis nur, ke la kandidato “montru interesiĝon pri Esperanto kaj pretu lerni ĝin”. La unua volontulo efektive lernis Esperanton dum sia volontulado en la Centra Oficejo, ĉar ŝi estis la sola neesperantlingvano en la oficejo.

Kiam aperis pliaj neesperantistaj volontuloj la ekvilibro tamen ŝanĝiĝis. La novaj volontuloj parolas angle inter si, kaj anstataŭ Esperanton la laborantoj de UEA nun estas same devigataj paroli la anglan por povi komuniki kun la novaj volontuloj.

Laŭ fontoj kun bona kono pri la situacio en la Centra Oficejo, iuj el la novaj volontuloj montras nenian interesiĝon pri Esperanto kaj rifuzas diri eĉ unu vorton en la lingvo, kion ja eblas kompreni – ili venis al la Centra Oficejo ne ĉar ili mem specife interesiĝis, sed ĉar Eŭropa Volontula Servo sendis ilin tien.

La kafoĉambro de la Centra Oficejo en pli fruaj jaroj estis la loko, kie la oficistoj ĉiutage je difinita horo kolektiĝis por babili pri aktualaj temoj de la oficejo, de la movado kaj de la tuta mondo. La kafkunvenoj iĝis institucio de la asocia kulturo, kaj dum ili precipe la novaj volontuloj povis multon lerni pri la funkciado de UEA kaj la tuta Esperanto-movado.



Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Novaj horizontoj trans Plutono

En 2015 la spacmisio “Novaj Horizontoj”, sendita de NASA en 2006, vizitis Plutonon, la lastan planedon de la sunsisistemo, kiu neniam antaŭe estis esplorita de spacesplorilo. Efektive, Plutono ne plu estas konsiderata planedo, ĉar samjare, en 2006, la Internacia Astronomia Unio decidis modifi la difinojn de planedo kaj kreis novan grupon de etaj astroj nomataj “nanoplanedoj”, al kiu nun apartenas Plutono kaj kelkaj aliaj similaj objektoj, eĉ pli foraj de Suno. La esploro “Novaj Horizontoj” preterflugis Plutonon kaj estis direktita por viziti ankoraŭ pli foran astreton, unu el multegaj orbitantaj Sunon en la tiel nomata Kuiper-a Zono.

La planedoserĉantoj

Ĝis la 18a jarcento la homaro konis nur kvin planedojn, kiuj estas videblaj per la nuda okulo: Merkuro, Venuso, Marso, Jupitero kaj Saturno. En la dekoka jarcento astronomoj sugestis la ekziston de plia planedo, trans la orbito de Saturno, pro perturboj al ties orbito.

En 1781 ĝi estis malkovrita de William Herschel kaj nomita Urano. Sesdek kvin jarojn poste en simila maniero estis malkovrita Neptuno, pro perturboj en la orbito de Urano. Komence de la 20-a jarcento, amatora astronomo Percival Lowell sugestis, ke devioj en orbito de Neptuno estis kaŭzitaj de pli malproksima objekto, kiun li nomis planedo X. Li kalkulis ĝian supozatan lokon esperante ke ĝi estos malkovrita kiel Neptuno, kiu estis malkovrita en 1846 kalkulante la perturbojn de la kalkulita orbito de Urano. Ĝi estis efektive malkovrita en 1930 de la juna observanto Clayde Tombeaugh [Tombo]. Oni nomis la novan planedon Plutono, laŭ la frato de Jupitero, dio de la infero en la romia mitologio. Sed la nomo ankaŭ memorigas la unuajn literojn en la nomo Percival Lowell. Poste evidentiĝis, ke la maso de Plutono estas multe pli malgranda ol necese por influi la orbiton de Neptuno. La neptuna orbito-deviado estis klarigita per pli preciza mezurado fare de *Voyager* en 1989.

Plutono fariĝis nanoplanedo

Plutono orbitas Sunon en distanco 30-50-obla ol tiu de Tero kaj havas temperaturo de minus 237 C° (44 gradoj super la absoluta nulo). Ĝi diferencas de ĉiuj aliaj planedoj laŭ sia orbito kaj laŭ siaj fizikaj kvalitoj. Ĝi ne nur estas la plej malproksima de Suno, sed ĝia orbito estas elipsa, kontraŭe al la aliaj planedoj kies orbitoj estas preskaŭ cirklaĵ. Ĝia orbito ankaŭ estas kliniĝinta al la ekliptiko, la ebena, en kiu Tero kaj ĉiuj aliaj planedoj ĉirkaŭas Sunon. Kiam oni sukcesis sufiĉe akurate mezuri la grandecon de Plutono, evidentiĝis ke ĝi estas multe malpli granda ol oni pensis – ĉirkaŭ triono de nia Luno. Ankaŭ laŭ la konsisto ĝi diferencas – dum la aliaj planedoj estas precipe gasaj aŭ rokaj, Plutono estas farita ĉefe el glacio. Pro tio la astronomoj opinias, ke Plutono naskiĝis alimaniere ol la ceteraj planedoj.

En la 1990aj astronomoj komencis malkovri plurajn astrojn, similajn al Plutono, sed ankoraŭ pli forajn de Suno (la plej granda el ili nomiĝas Eriso, kaj ĝi estas eĉ pli peza ol Plutono). Sekve la Internacia Astronomia Unio (IAU) decidis modifi la difinon de planedo, tiel ke Plutono ne plu estas konsiderata planedo, sed apartenas al nova grupo de malgrandaj astroj nomataj nano-planedoj. En ĝi troviĝas ankaŭ la plej granda asteroido – Cereso – kaj pluraj novaj astroj, kiuj troviĝas en la regiono ekster la orbito de Neptuno, nomata la Kuiper-zono, nomita laŭ la usona-nederlanda astronomo Gerard Kuiper kiu unue antaŭvidis ĝian ekziston.

La naŭa planedo

En 2016 astronomoj anoncis observojn kiuj forte subtenas la ekziston de nova planedo, multe pli fora kaj multe pli granda ol Plutono. Ĉ. 100 jarojn post kiam astronomoj unue sugestis la ekziston de naŭa planedo en la suna sistemo, 85 jarojn post kiam Plutono estis malkovrita kaj fariĝis la “naŭa planedo”, kaj dek jarojn post kiam la posteno de “naŭa planedo” denove ekvakis. La nova planedo ankoraŭ ne estas rekte observita, nur kalkulita laŭ ĝia verŝajna influo je la orbitoj de nanoplanedoj en la Zono de Kuiper. Efektive ne temas do pri vera malkovro de planedo.

Laŭ la esploro, publikigita la 20an de januaro 2016 en la renomaj sciencaj revuoj *Astronomical Journal* kaj *Nature* de la esploristoj Batygin kaj Brown, la nova “naŭa planedo” havas mason dekoble pli grandan ol Tero, ĝia diametro estas 2-4-oble pli granda ol Tero kaj ĝi orbitas Sunon unu fojon en 10-20 mil jaroj, en longforma elipsa orbito 200-600-oble pli granda ol tiu de Tero (kompare kun 30-50 de Plutono).

Batygin kaj Brown kalkulis la ekziston de la planedo uzante matematikajn modelojn kaj simuladojn, surbaze de la orbitoj de ses malgrandaj korpoj en la Zono de Kuiper. La atendebla maso de la supozata planedo estas 5000-oble pli granda ol tiu de Plutono, kio signifas, ke ĝi estas sufiĉe granda por konveni al la nova difino de planedo, Batygin kaj Brown montris kiel la naŭa planedo povas klarigi la orbitojn de la plej malproksimaj objektoj trovitaj en la Kuiper-zono.

Nun, post kiam ĝia orbito estis establita, esploristoj esperas, ke ĝi estos malkovrita ene de kelkaj jaroj. Dume Brown kaj aliaj astronomoj komencis serĉi la naŭan planedon per teleskopoj. La orbito estas konata nur krude, kaj ne estas klare, kie ĝi estas situanta. Se la planedo nuntempe troviĝus proksime al perihelio, la plej proksima punkto al Suno, ĝi estus pli brila kaj povus esti trovita en malnovaj fotoj de tiu regiono en la ĉielo. Se, aliflanke, ĝi momente situas ĉe la ekstrema fino de sia orbito, nur la plej grandaj teleskopoj de la mondo povus detekti ĝin.


“Novaj Horizontoj” kaj MU69

“New Horizons”, lanĉita en 2006, estis akcelita per la pasado apud Jupitero kaj atingis Plutono la 14an de julio 2015. Unuafoje la homaro ricevis proksiman rigardon de Plutono, kiu ĝis tiam dum pli ol okdek jaroj estis konata kiel punkto de pala lumo en la fora periferio de la sunsistemo. La misio malkovris kompleksan mondon, riĉan je interesaj detaloj. “New Horizons” sendis al Tero multajn detalan bildojn de Plutono kaj ĝia luno Karono. La frosta surfaco de Plutono ege varias de loko al loko kaj malkaŝas diversajn geologiajn formojn kaj plurajn specojn de frostita metano, solida nitrogeno, glacia akvo ktp. La analizo de la bildoj kaj mezuradoj daŭras ankoraŭ kaj malkaŝas novajn detalojn kaj variajn formojn.

Post la preterpasado de Plutono “Novaj Horizontoj” estis direktita por pasi, komence de 2019, apud la astro kun la kataloga nomo 2014 MU69, malkovrita en la Zono de Kuiper en 2010. Lastatempe NASA lanĉis publikan kampanjon por trovi pli allogan nomon por tiu fora glacia astreto. NASA invitis proponojn por pli interesa nomo, aŭ fakte nom-duopo, ĉar la objekto ŝajnas konsisti el du partoj. Responde mi proponis Esperanto kaj Zamenhof. Subtenis la proponon Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes, sed ĝis nun la komisiono ne inkludis tiun proponon en la liston de ĉ. 20 nomoj por kiuj eblas voĉdoni en la retejo de la kampanjo <http://www.frontierworlds.org/home>.

Amri Wandel

Bildo: NASA/Johns Hopkins University Applied Physics Laboratory/Southwest Research Institute – <http://photojournal.jpl.nasa.gov/jpeg/PIA19703.jpg> <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=41470872>



Antaŭ 125 jaroj, la 21an de decembro 1892 naskiĝis Theodor “Teo” Jung (1892-1986), ĵurnalisto kaj esperantisto, fondinto kaj redaktoro de *Heroldo de Esperanto*. Okaze de la jubileo ni publikigas artikolon pri li el la baldaŭ eldonota enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (NDK).

Teo Jung (1892-1986)

Jung, Theodor Karl August Heinrich; pli konata kiel Teo Jung; Esperanto-pseŭdonimoj: Egruho, Odo Lajuna, Rejnardo, Dalen, R-ano, Tojo, Joto, Zigzage k. a. Germano, nederlanda ŝtatano. Naskiĝis la 21an de decembro 1892 en Meckenheim, Nordrejn-Vestfalio (Germanio). La plej aĝa filo de presisto kaj gazeteldonisto Heinrich Jung. En 1898-1903 lernis en popollernejo de Meckenheim, poste en gimnazio de la najbara urbeto Rheinbach. En 1904-11 kun la familio plurfoje ŝanĝis loĝlokojn. En 1908 la 15-jara Teo devis interrompi siajn gimnaziajn studojn por helpi al la patro en ties presejo, instalita en Kolonjo. De aprilo 1912 laboris kiel kompostisto kaj presisto en diversaj presejoj en Bavario. En aŭgusto 1914 dungiĝis en presejo en Vestfalio. Kvankam komence de la Unua Mondmilito Teo Jung estis atestita kiel netaŭga por soldata servo, en septembro 1916 li estis rekrutita, servis en Germanio kaj Francio, sed en januaro 1917 ricevis forpermeson por laborservi en presejo.

En januaro 1920 Teo kun sia frato Heinrich transprenis la patran presejon en Horrem apud Kolonjo kaj rearanĝis ĝin kiel entreprenon "T. & H. Jung", kiu okupiĝis pri presado kaj eldonado germanlingva kaj Esperanta. Danke al la postmilita inflacio en Germanio (uzante valutajn abonkotizojn) ili modernigis la maŝinaron, konstruigis en Horrem presejon kaj kelketaĝan domon, kun lueblaj oficejoj kaj loĝĉambroj. En 1928 la fratoj dividis la firmaon; Teo Jung ricevis la Esperanto-fakon kaj establis ĝin en Kolonjo.

Pro la naziaj persekutoj kontraŭ Esperanto kaj pro interveno de Gestapo, en 1936 Jung likvidis sian entreprenon kaj migris kun sia familio al Nederlando, kie li ekloĝis en Hago (kvartalo Scheveningen), daŭrigante sian eldonadon ĝis la invado de nazioj en 1940. Dum la Dua Mondmilito laboris en financa oficejo de la germania komandantejo (1942-45). Por eviti militservon, en februaro 1945 aranĝis daŭran enhospitaliĝon. En 1946 rekomencis la eldonadon. Ricevis grandan kompenso-pagon kaj pension de la Germana ŝtato.

Teo Jung lernis fremdajn lingvojn kaj stenografion, ludis mandolinon. En 1919 li partoprenis en la separatisma movado en Rejnlando. En 1931 edziĝis kun Agnes Schröder (1900-93), sola filo Heinz-Teo "Theo" Jung (1932-98). Li mortis la 12an de majo 1986 en Hago.

Teo Jung lernis Esperanton en 1909 aŭ 1910. Estis bibliotekisto de la Kolonia Esperanto-Societo, gvidis Esperanto-kursojn, kunfondis du Esperanto-grupojn. En 1919 restarigis kun aliaj la Rejnlandan-Vestfalian Esperanto-Ligon, fariĝis ĝia estrarano, eldonis en Horrem ĝian organon *Progreso* de marto ĝis oktobro 1919. Partoprenis preskaŭ en ĉiuj UKoj ekde 1921, vizitis multajn landojn.

En 1920 Jung fondis sendependan, neŭtralan semajnjurnalon *Esperanto Triumfonta*, en 1925 ŝanĝis ĝian nomon al *Heroldo de Esperanto*. De decembro 1924 ĝis la fino de 1925 ĝi aperis duonsemajne, dum la 15a UK (1923) en Nurenbergo

ĉiutage. Inter la regulaj temaj paĝoj estis: *La Bela Mondo* (turismo k. s.), *Nia Revueto* (por junuloj), *La Strigo* (literaturo kaj artoj), radiopaĝo *La Anteno*, muzika paĝo *Sur la kvin linioj*, *La Regno Virina*, *Humuro*, *Distro*, *Ludo* k. a. Regule aperis la rubrikoj *Niaj leteroj el Tutmondoj*, *La Libera Tribuno de l' Esperantistaro* kaj *La politiko en la opinio de l' esperantistaro*. Kelkaj kontribuoj en tiuj rubrikoj elvokis tiel akrajn vortbatalojn, ke fine la politikaj temoj estis forigitaj el *Heroldo*. Jung eldonis kaj redaktis ankaŭ la gazeton *Verda Stelo* (1926-28) kaj eldonis supleme al *Heroldo* la unuan esperantologian periodaĵon *Lingva Kritiko* (1932-35).

Ekloĝinte en Nederlando, Jung redaktis la organon de la Internacia Esperanto-Ligo (IEL) *Esperanto Internacia* (1936-40) samtempe kun *Heroldo de Esperanto*, kiu ankaŭ estis organo de IEL. En 1962 li vendis *Heroldon de Esperanto* al Gian Carlo Fighiera, kies edzino Ada Fighiera-Sikorska redaktis ĝin dum 1962-96.

En 1925 Jung fondis librofakon de *Heroldo de Esperanto* kaj eldonis pli ol cent librojn, inter kiuj estis *En okcidento nenio nova* de Remarque, *Taglibro* de Anne Frank, *Tartarin de Taraskono* de Daudet, *Kredu min, sinjorino* de Cezaro Rossetti k. m. a.

Teo Jung verkis poezion kaj prozon, recenzojn, tradukis. En 1910 li publikigis sub pseŭdonimo sian unuan originalan rakonton en *Germana Esperanto-Gazeto*. En la 12aj Internaciaj Floraj Ludoj (1926) ricevis la ĉefpremion "Natura Floro" pro la balado *La alta kanto de la amo*. En 1927 aperis lia originala romano *Landoj de l' Fantazio*, unue felietone publikigita en *Heroldo de Esperanto*. Liaj verkoj estas publikigitaj en *Esperanta Antologio* kaj en *33 rakontoj*. En 1979 aperis lia biografia libro *Ĉiu ĉiun*. Jung kunaŭtoris lernolibrojn de Esperanto por germanoj, verkis pri lingvaj demandoj. Membro de la Lingva Komitato (1933-49) kaj de la Akademio de Esperanto (1949-71), Honora Membro de UEA (1952). Esperanton sciis liaj edzino, filo, fratino Maria, bofratino Elli Schröder.

Ĉefaj verkoj

La lastaj tagoj de Dro L. L. Zamenhof kaj la funebra ceremonio (Kun A. Oberrotman, 1921);

La alta kanto de la amo (1926);

Landoj de l' fantazio (1927);

Gudrun (1928);

Gerstäcker F. *La ŝipĉarpentisto* (Tr., 1928);

Das leichte Esperanto: Lehrbuch für Anfänger: von einem Praktiker und einem Pädagogen (Kun W. Wingen, 1929);

Remarque E. M. *En okcidento nenio nova* (Tr. kun aliaj, 1929);

12 Abende Fortbildung in der Weltverkehrssprache Esperanto: Lehr- und Übungsbuch für Fortgeschrittene (Kun W. Wingen, 1932);

Heroldo-Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch, Deutsch-Esperanto nebst Suchbüchlein (1932);

La arĝentjublea kongreso: Detala raporto pri la 25-a Universala Kongreso de Esperanto en Köln (1933);

Ek al batal'! (1935);

De Muheddin ĝis Mundilatin: Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj (1937);

La kunmetitaj verboformoj: Pri la absurda ata-ita-problemo (2 vol., 1960-61);

La Esperanta konjugacio. Kun pli ol 1000 ekzemploj plejparte Zamenhofaj, kaj kun abundaj klarigoj kaj konsiloj precipe pri kunmetitaj verboformoj (2 vol., 1965-66);

Tri homoj flugis al Luno ... sed mondlingvanoj kverelas (1969);

Ĉiu ĉiun: Sep jardekojn en la Esperanto-movado: Memoraĵoj de 86-jara optimisto (1979);

Wörterbuch der Internationalen Sprache: mit einer Satzustersammlung zur Erleichterung des Beginns einer Schülerkorrespondenz (1979).

Pri Teo Jung

CEOLE, p. 129-130; EdE, p. 191, 210-211, 270 k. a.; EenP, p. 440; HEL, p. 156-157; OVP, p. 116-117.

Dijk Z. van. *Historio de UEA*. Partizánske, 2012, p. 96, 122, 133 k. a.; Dijk Z. van. *La Asocio*. Antverpeno, 2008, p. 32, 179-180, 182-191; Gorecka H. *Heroldo de Esperanto (Dek gazetoj)*. Kaliningrado; Kaunas, 2010, p. 17-19; Jung T. *Ĉiu ĉiun: Sep jardekojn en la Esperanto-movado; memoraĵoj de 86-jara optimisto*. Antverpeno, 1979.

Esperanto, 1952, №12 (Honora Membro de UEA); M. H. V. *Ora festo de Teo Jung (Esperanto*, 1959, №11); *Esperanto*, 1986, №5 (Nekrologo); *Heroldo de Esperanto*, 1986, №8 (Nekrologo).

**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Aŭtoroj: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonantoj: Sezonoj kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Aperos en la fino de la Zamenhofa Jaro 2017

Prezo: 30 eŭroj

Jam antaŭmendebla kontraŭ 25 eŭroj




Kulturo



Bonega novaĵo por la verdaj muzikamantoj: aperis la tria Esperanta albumo de la projekto i.d.c. (inicialoj dc / initials dc) de Eric Languillat. *La Granda aventuro* estas vinila (jes, finfine vinila!!!) albumo, jam mendebla en kaj ekster Esperantujo.

Kara Lutek

de Sten Johansson



Jam aŭtune mi vidis lin dufoje, vizitante la societon Ĥibat Cion¹ kun miaj fratino kaj bofrato. Efektive mi ne tre entuziasmis pri la ideo grupe elmigri al la sovaĝa Palestino. Amon al Ciono mi kompreneble ja sentis, tamen ĉefe en figura senco. Mi amis nian Cionon ĉi tie, ne sur tiu fora tero sunbakita kaj senciviliza. Krome, mi trovis tion sufiĉe ridinda afero, imagi kelkajn senmuskolajn junajn teoriulojn el la urbego Varsovio fosi en la tero por planti mi-ne-scias-kion kultiveblan en tiu fora lando. Tamen mi ja lojale klopodis kolektante monon por helpi al la aventuroj, kiuj volis provi la elmigradon malgraŭ ĉiuj ties riskoj.

Nu, unuafoje mi ne multe atentis lin. Li estis unu el tiuj movaduloj, kiuj senfine diskutadis pri societa statuto kaj aliaj sekaj formalajoj. Sed poste mi ja spertis, ke li havas ankaŭ alian flankon, krom tiu de pedanta burokrateto. Montriĝis, ke li havas ideojn eĉ pli frivolajn ol tiun pri elmigrado, kaj pri unu el tiuj ideoj li baldaŭ parolis al mi.

Tio okazis kiam mi post kelka tempo revidis lin dum supeo en la hejmo de mia fratino kaj bofrato. Jozef Levite, mia bonstata bofrato, estis unu el la pli aĝaj aktivuloj de Ĥibat Cion, kaj li invitis kelkajn samideanojn por festi ion, mi ne plu memoras precize kion. Eble temis pri bona negoco en lia komerco. Jen mi do revidis tiun junan viron kaj oni konatigis nin unu al la alia. Kiam Jozef prezentis lin jide kiel Lejzer Zamenhof, li ridetis milde.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La Granda Aventuro: Nova albumo de i.d.c.



Titolo: *La Granda Aventuro*

Artisto: i.d.c. (*inicialoj dc*)

Ĝenro: Alternativa popo – elektropopo – popo

Formo: LD Vinila Disko – 10 titoloj – 37:00 min

i.d.c. (*inicialoj dc* / *initials dc*) estas muzikprojekto fondita de Éric Languillat en 2003 kaj bazita en Frankfurto-ĉe-Majno (Germanio). Kvin jarojn post *Signoj de viv'*, i.d.c. revenas kun *La Granda Aventuro*, sia tria albumo tute en Esperanto.

La ŝatantoj de la projekto ĝojos retrovi la bonvenigan duonviglan-duon-melankolian etoson kaj vojaĝi en bunta popmuzika universo kie ĉiu kanto estas kiel alia muzika astro kiun la artisto invitas esplori, gvidante la aŭskultantojn per konata voĉo kaj metafor-riĉaj tekstoj. La aranĝoj kaj miksado de ĉi tiu albumo estis fajnigitaj kiel neniam antaŭe, kaj la profesia produktado (ĝis la kovrilo!) certe kontentigos la muzikŝatantojn ene kaj ekstere de la Esperanto-komunumo.

Kun jam tri tutesperantaj albumoj (*Urbano*, *Signoj de viv'*, *La Granda Aventuro*) eldonitaj kaj la prezento en la reto de pluraj altkvalitaj videaĵoj, i.d.c. enradikiĝis kiel originala kaj valora muzikvidea arta projekto.

Notu, ke la vinildisko inkluzivas kuponon por elŝuti la albumon ciferece.

Por aŭskulti fragmentojn aŭ mendi la diskon kaj elŝuti muzikojn aŭ la albumon laŭ mp3 aŭ ogg formatoj ĉe la Vinilkosmo-platformo:

<http://www.vinilkosmo-mp3.com//eo/popo-roko-hiphopo-elektronik/inicialoj-dc-161/3-la-granda-aventuro.html>

Por vidi la resuman biografion de i.d.c. klaku ĉe:

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/popo-roko-hiphopo-elektronik/inicialoj-dc-161.html>

Por aŭskulti la albumon elsendflue ni rekomendas aboni al la Abonklubo por aliri la justan elsenfluejon 1D tuŝ:

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Literatura konkurso *Liro*-2017

La redakcio de *La Ondo de Esperanto* denove invitas al la tradicia literatura konkurso *Liro*. Same kiel en la du lastaj jaroj, ankaŭ en 2017 la konkurso havos nur tradukajn branĉojn.

Por *Liro*-2017 estas proponataj du tradukendaj verkoj:

1. Traduko el la angla: *To the Man on the Trail* – novelo de Jack London;

2. Traduko el la rusa: *Obruĉ* – novelo de Fjodor Sologub.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*:

<http://esperanto-ondo.ru/Ind-liro.htm>

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn aŭ komputile kompostitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la retadreso sezonoj@yahoo.com.

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 31a de decembro 2017.

La laŭreatoj (unu en ĉiu branĉo) ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizantoj ĝis la 1a de januaro 2021 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono. La plej bona traduko de la novelo de Jack London aperos en la antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*.

Bonŝancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*-2017

La jarabono por 2018 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.



Tri enigmoj

Kioma horo estas?

Se nun estus je du horoj pli malfrue, tiam ĝis la noktomezo restus double malpli da tempo ol, se nun estus je unu horo pli malfrue. Kioma horo estas nun?

Urbo de honestuloj aŭ mensoguloj?

En iu lando estas du urboj. En unu loĝas homoj, kiuj ĉiam diras veron, en la alia – nur tiuj, kiuj ĉiam mensogas. Ili ĉiuj venas gaste, tiel en ajna el la du urboj oni povas renkonti honestan homon kaj mensogulon. Vi trafis unu el la urboj. Kiel, farinte nur unusolan demandon al unuerenkontita homo, diveni, al kiu urbo vi trafis – en la urbon de honestuloj aŭ en la urbon de mensoguloj?

Kiom da anseroj?

Flugis aro da anseroj. Unu antaŭe, du poste; unu poste kaj du antaŭe; unu inter la du kaj tri en la vico. Kiom da anseroj flugis?

Bonvolu sendi viajn respondojn retpoŝte (sezonoj@kanet.ru, kopie al sezonoj@yahoo.com) antaŭ la 25a de decembro 2017.

Amuzaj dialogoj (ne de A. Lienhardt)

En malsanulejo

- Via edzo bezonas absolutan kvieton. Mi preskribas trankviligajn tabloidojn.
- Kiam mi devas doni ilin al li?
- Neniam! La tabloidoj estas por vi!

- Kio pri via problemoj?
- Mi solvis ĝin.
- Pri kio estis problemoj?
- Mi ne scias.
- Sed, kiel vi solvis ĝin?
- Mi decidis, ke tio ne estas problemoj.

- Pardonu, sinjoro, mi ne povas enlasi vin en la kazonon! Vi ne havas kravaton!
- Kio do? Jen tiu ulo estas tute nuda!
- Jes, sinjoro! Sed li eliras...

Plukis kaj tradukis **Kukucapa Nemoskovskaja**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Plej certa laboro - laboro per oro

... ĉiu estrarano ja kostas iom da mono... Tamen kontraŭ tiu investo UEA ricevas multege da laboro... temas pri la kunorigado de projektoj, volontuloj, kaj tiel plu. (Mark Fettes, <http://www.liberafolio.org/2017/11/21/mark-fettes-ni-ciu-j-konscias-pri-la-granda-laboro-antau-ni>)

Pli obscena ol eĉ bibliotekoj

La svisa radikala predikisto Tariq Ramadan... estas... obsedulo, kiu pli volonte frekventas la pornajn TTT-paĝojn ol la universitataj bibliotekoj. (La Kuracoservo, *La Kancer-Kliniko*, 2017, N^o164, p. 4.)

Unu vundo alian kuracas?

Doktoro Karmaker ... ricevas multajn similajn vunditojn. “*Mi ofte akceptas personojn kun vundoj kiel tiu ĉi, aŭ per kugloj*”, li mencias. (<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2017/09/bangladeso-nekonstetebbla-manko-de-humanitara-helpo-por-la-rohinggaj-rifugintoj.html>)

Instrumento por turmento?

Kial honti pri tia bela intrumento kaj kaŝi ĝin en la bantuko? (Neatendita renkonto..., <http://fikrakontoj.unblog.fr/2015/04/29/neatendita-renkonto>)

Ĉiam la sama disko

... la temo de nia JUBILEA ESPERANTO-KUNVENO ... estos KIEL MI EFIKE KONTRIBUOS AL LA DISKVASTIGADO DE ESPERANTO EN KOLOMBIO ĈI-JARE... (Luis Jorge Santos Morales, 31 maj 2012, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/landa-agado/conversations/topics/17328>; rimarkis Lu Wunsch)

Interperlacio: ĉu Perla inter ĉio?

... la Konsulino neniam kunsultis la senatajn grupestrojn... ne respondis al Forumo interperlacio liverita antaŭ kvin semajnoj. (Mallaŭda mocio kontraŭ la Konsulino, HeKo 663 3-C, 31 okt 17, <http://www.esperantio.net/index.php?id=3373>)

Sekreto nun sen vualo

Christian Rivière ... malkaŝas sian ligitecon al informadiko en la eseo pri mezurado de inform-kvanto. (Ilona Koutny: Interesa kaj leginda kolekto, <http://sezonoj.ru/2017/11/recenzo-80>)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горещкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarete 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

